


BONA ESPERO

ORGANO DE LA SUD-AFRIKA
ESPERANTO-ASOCIO
KAJ REVUO
DE LA ESPERANTA KULTURO

Volumo: 1987

Numero 1

ISSN 0605-7024



SEK

ESPERANTO

JUBILEA FESTADO

-1987-

ENHAVO

Grava demando: ŝanĝi nian nomon	1
Nia 25-jara kongreso jubilea: grandiozaj perspektivoj	2
Korespondi deziras – 1	3
La promeso de Svazilando	4
Nova redakcia aranĝo	
Pli pri la io-manio	5
Biciklos al Sud-Afriko	6
Pli pri Esperantaj simboloj	7
Objektoj kun la nomoj <i>Esperanto</i> kaj <i>Zamenhof</i>	8
Al Edwin kaj Ria	
Dodojce pri adresoj	9
Vizito al Ĉinio – Julio/Aŭgusto 1986	
Aperis la <i>Kolektitaj poemoj</i> de Newell	11
Helpopeto pri neologismoj	12
Du gravaj artikoloj	13
Logikaj enigmoj: Enigmo 1	13
Judaj festoj	15
Kontribuaĵo por vortaro de Esperantaj mallongigoj, sigloj kaj akronimoj	16
Roze	19
Korespondi deziras – 2	20
Muroj kontraŭ barbaroj	21
Eksedziĝo	
Aliaj redaktoroj, bonvolu atenti	22
Pri <i>Bona Espero</i> kaj <i>Sud-Afrika Esperanto-Asocio (SEA)</i>	23

GRAVA DEMANDO: ŜANĜI NIAN NOMON

POST niaj unuaj 25 jaroj kiel organizita Asocio leviĝis la demando, ĉu aŭ ĉu ne ŝanĝi nian nomon. Ĉe la Estrarkunveno de 1987.05.28 la prezidanto menciis kaj preskaŭ unuanime oni akceptis la ideon, ke estontece nia nomo jam ne estu *Sud-Afrika Esperanto-Asocio* sed *Esperanto Asocio de Suda Afriko*. Tio celas, ke ni fariĝu regiona anstataŭ nur unulanda organizo.

Ni urĝe petas ĉiujn membrojn informi nin pri siaj reagoj.

Ekzistas multaj organizoj de la subkontinento, aktivaj ne nur en nia sed ankaŭ najbaraj landoj, kies nomoj enhavas la vortojn *Suda Afriko* anstataŭ *Sud-Afriko*. Ankaŭ ĉe ni temas pri tio, ke ni deziras plivastigi nian aktivadon, kunlaborante kun niaj samcelanoj translime – se eble ĝis la ekvatoro.

Ĉe nia Aprila landokongreso en Port Elizabeto, kiel ankaŭ dum la menciita Estrarkunveno, evidentiĝis, ke pluraj el ni tre deziras varbi pliajn homojn neblankajn, precipe ankaŭ la nigrajn. Aldona faktoro grava estas, ke post du jaroj ni volas okazigi nian venontan kongreson en najbara lando, kaj inviti tien esperantistojn el aliaj Afrikaj ŝtatoj. Bonvolu legi pri tio ĉi en apuda raporto tre ekscita.

Kaj temas ne simple pri tio. Ni konvinkiĝis lastatempe, pro la spertoj de diversaj kunlaborantoj, ke ekzistas granda bezono, kaj estonteco, por Esperanto en la tria mondo. Tion pruvas multaj ekzemploj el Brazilo, Ĉinujo, Irano kaj pli nordaj landoj sur nia propra kontinento. La kialoj koncernas plurajn faktorojn de la postimperia epoko, el kiuj ni mencias nur unu.

En kaj ekster Sud-Afriko milionoj da homoj indiĝene Afrikaj restas forbaritaj de efika instruado kaj vivsuceso, ĉar lerneje oni ankoraŭ uzadas kiel instruperilon iun fremdan lingvon tro komplikan, ĉu la Anglan, ĉu la Francan, ĉu la Portugalan. Vanas la pretendo, aktuala en nia lando, ke tiumaniere oni havigos al la nigraj infanoj instruadon *egalan* al tiu de la blankaj. Egala ĝi ne povas esti, eĉ se oni forigus ĉiujn aliajn malhelpaĵojn – inkluzive de la faktoroj politikaj –, ĉar temas pri la Angla, kiun niaj nigruloj pleje scipovas malbone kaj neniam lernas kontentige, dum por multaj blankaj infanoj ĝi estas la lingvo gepatra.

Precipe malesperiga montriĝis la situacio kiam en unu ŝtato ekzistas pluraj lingvoj indiĝenaj, dum aliflanke la plejmulto apenaŭ (aŭ eĉ tute ne) scipovas la koncernan lingvon fremdan lerneje uzatan kiel instruperilon. Por tiaj infanoj kaj plenkreskuloj Esperanto povas esti esperdonanto, vera savrimedo.


Tia plivastigo de nia agado ekster niajn limojn neniel lezus la Statuton, kiu kontraŭe jam deklaras, ke rajtas aparteni al nia Asocio ĉiu persono, paginta la kotizon kaj subtenanta nian celon – “sen diskriminacio surbaze de raso, ŝtataneco, religio aŭ sekso.”

Ni efektive havas membrojn neblankajn en Sud-Afriko, du el ili nigrajn. Ili estas plenrajtaj, egalaj kaj bonvenaj ĉe ĉiu nia kunveno. Krom tio, ni ankaŭ jam havas

iajn anojn kiuj loĝas en najbaraj landoj.

Espereble ĉiu subtenos la proponon pri la nova nomo por nia Asocio, plene konsciante pri la graveco de tio. La ŝanĝon mem tamen povas fari nur aŭ Jarkunveno aŭ speciala ĝenerala kunveno de la membroj. Pri tio aperos posta anonco.

SEA



NIA 25-JARA KONGRESO JUBILEA: GRANDIOZAJ PERSPEKTIVOJ

Do okazis tiu unua landokongreso nia, la 3an ĝis la 6a de Aprilo 1987, ĉe Seaview Guest Farm, apud Port Elizabeto, kun la aferoj ĉirkaŭaj, inkluzive programon por la publiko tiuurba, la 7an vespere. Anticipe iuj havis dubojn, ĉu la aranĝaro fakte montriĝos efektivebla, ĉefe pro niaj grandaj distancoj kaj membroj ne multaj.

Sed ĉio estis tre sukcesa! Grave rolis en tio la organiza laborego de la Port Elizabeta Klubo, gvidate far la senlacaĵ Adèle Fouché kaj Cobus Zeelie, universitata docento – kiu ankaŭ oficiale instruas Esperanton ĉe la loka teknikono (politekniko).

Ĉeestis pli ol 50 personoj, kaj la tuta programo efektiviĝis glate per la Internacia Lingvo. Nur malmulte oni krokodilis, inter la eroj. Detale raportos pri la tuto la venonta eldono de *Bona Espero*, sed intertempe ni mencias kelkajn lulpunktojn.

Impresis la klero kaj multflankeco de la kontribuajtoj. Precipe frapis la talento kaj entuziasmo de novaj adeptoj, interalie junaj inteligentaj universitatuloj, ĉu lektoroj ĉu studentoj.

En bela preĝejo kampara sur altaĵo, de kie videblis la blua Hinda Oceano sub ĉielo preskaŭ same blua, okazis la unua Sud-Afrika Esperanta diservo ekumena, kiam predikis la prezidanto, Sabaton la 4an de Aprilo. Dum la aliaj aranĝoj vere mirigis iuj prelegantoj, inter ili la juna Simon Donnely el Kaburbo, kiu komencis lerni la Internacian Lingvon antaŭ nur unu jaro kaj duono.

Gravaj decidoj inkluzivis la reorganizon de SALEI, la lando sekcio de ILEI, sub kies egido la Asocio eldonos lernolibron en la Afrikansa. La manuskripton, preparitan de Ernst Venter, kun revizioj de d-roj Johan de Klerk kaj Japie Spoelstra, oni dum tiuj tagoj transdonis al Edwin de Kock por finpretigo.

Alia grava decido estis ekde nun aranĝi Kongreson ĉiun duan jaron, kaj ke dum 1989 ĝi okazu – se eble – en Svaŝilando, kun invito al nigraj esperantistoj el la cetera Afriko. S-ro Zoltan N. Boglari, inĝeniero kiu loĝas tiustate en Manzini, tre klopodis pri ĉi tio, promesante entrepreni la lokan organizadon, kun helpo el

Transvalo. Koncerne lian postan sukceson tiurilate, efektive mirindan, bonvolu legi la apartan raporton.

Ne forestis la publikaj reeĥoj ĉirkaŭkongresaj. La plej drameca estis televida novaĵo pri la Kongreso, kiun oni dismontris tra la tuta lando per TV1, TV2 kaj TV3. La du kanaloj laste menciitaj uzas la ĉefajn lingvojn indiĝenajn de la Sud-Afrika regiono. Tio okazis la 6an de Aprilo, la vesperon post la Kongreso ĉe Seaview Guest Farm, metante belan punkton post ĉio, kaj konsistigis la unuan televidan mencion pri Esperanto en tiu ĉi lando.

La loka radio de Port Elizabeto disaŭdigis krome intervjuon kun la prezidanto. kaj poste aperis artikolo en la tiuurba *Oosterlig*.

Sekvis aliregione diversaj prelegoj kaj ĵurnalerroj, el kiuj ni aparte mencias la jenajn:

Pri la Kongreso raportis Johan Hammes la 30an de Aprilo en *Die Perdeby*, studenta ĵurnalo de la Pretoria Universitato, kie li gvidas volontulan kurson. La vicprezidanto. Axel von Blottnitz, prelegis en Orient-Kablada mezlernejo ĉe Port Alfred, pri kio (kaj biografie koncerne lin mem) raportis *The Kowie Announcer*, la 8an de Majo.

Tuj antaŭ sia samvespera forflugo al la Kongresurbo, la 2an de Aprilo, Edwin de Kock vizitis – laŭ ŝia propra peto – Annette Engelbrecht, bone konatan reĝisoron kaj aktorinon en Pretorio, por fari la preparan intervjuon cele al 20-minuta televida programo pri Esperanto. Tio rezultis el sugestoletero kiun skribis al la Sud-Afrika Disaŭdiga Korporacio s-ro J. Semmelink. De Kock kunirigis d-ron Jan Strydom, kun la celo ke oni uzu lian belan kantadon. Lastatempe ĉi tiu sukcesis akiri muzikajn kompanaĵojn de bone konata, antaŭ nelonge mortinta muzikistino, Sarie Serfontein Theron, Potchefstroom, por iuj el la originalaj Japaneskoj de Edwin de Kock, kiu ankaŭ tradukis kelkajn Afrikansajn kantojn en Esperanton. Laŭ lastatempaj raportoj bone progresas la planoj por tiu grava televida programo, kiun oni jam aprobis.

Dume en Svazilando okazis io eĉ pli grava . . . sed pri tio bonvolu legi raporton ĉi-kune.

KORESPONDI DEZIRAS – 1

S-ro Josefo Eurípedes Berágun, Rua Piauí, n-ro 2622, Vila Albertina, 14.100 Ribeirão Preto-SP, Brazilo, 30-jara studento fraŭla – kun vir(in)o. Komencanto en Esperanto, li ankaŭ jam studis diversajn aliajn lingvojn.

Berklia Esperanto-Ligo, p/a Paul New, 1167 Colusa Ave, Berkeley, Ca., 94707, Usono. – prefere kun personoj el ilia ĝemela komunumo Mathopestad.

S-ro D. Francisco Pérez Cruces, 1/Huesca n-ro 45, 4100 Sevilla, Hispanujo – nome de SEJO pri moderna muziko junulara.

LA PROMESO DE SVAZILANDO

REIRINTE hejmen post la Kongreso, s-ro Zoltan N. Boglari tuj ekagis. Li verkis du artikolojn por la *Swaziland Observer*, la plej grava ĵurnalo en Svazilando, kiu aperadas en Mbabane, la ĉefurbo.

Lia klopodo pri Kongreso en 1989 trovis rimarkindan reehon. Entuziasmiĝis la Ministro pri Instruado kaj Internaj Aferoj, precipe tial, ĉar oni invitos esperantistojn el ankaŭ la pli nordaj ŝtatoj de Afriko. Li promesis, ke oni senkoste disponigos halon ĉe la universitato, kune kun oficistaj helpantoj, al kiuj oni eĉ ordonos lerni la Internacian Lingvon por la okazo!

Ankaŭ specialan poŝtmarkon oni eldonos.

NOVA REDAKCIA ARANĜO

PRO la multokupiteco de la redaktoro (kiu laboras por la Internacia Lingvo ankaŭ kiel Asocia prezidanto, Akademiano kaj verkisto), li ne povas aperiĝi Bonan Esperon pli ofte ol unu aŭ du fojojn en la jaro.

Ĉar tio estas tro malofta, oni decidis ĉe la Jarkunveno, la 5an de Aprilo, ke tiun laboron ni nun dividos inter kvar personoj. Ili estos sinsekve la jenaj:

1. S-ro Edwin de Kock, Poŝtako 902-143, 0009 Bon Accord; tel. (012) 50621 (hejme), (01214) 2005/2006/2007/2008/2009 (labore).
2. S-ro J.J. (Cobus) Zeelie, Poŝtako 12271, 6006 Centrahil, Port Elizabeth; tel. (041) 73 1271 (hejme), (041) 531-1128 (labore).
3. D-ro Japie Spoelstra, Poŝtako 20185, 2522 Noordbrug, Potchefstroom; tel. (01481) 7428 (hejme), (01481) 22112 (labore)


kune kun

D-ro Johan de Klerk, tel. (01481) 21714 (hejme), (01481) 22112 (labore).

4. S-ro Simon Donnelly, 15 Garfield Road, 7700 Claremont, Kaburbo.

La venonta numero, eldonota de s-ro Zeelie, pritraktos ĉefe la Kongreson, inkluzive de prelegodetaloj, sed ankaŭ aliaĵojn. En ĝi aperos, krome, la eldonaj datoj por numeroj 3 kaj 4.

Bonvolu sendi la aperotaĵojn al la koncerna redaktoro.



PLI PRI LA IO-MANIO

EN sia artikolo "La io-manio" (*Svisa Esperanto-Revuo*, decembro 1986) Niklaus Weiss skribas pri la sinteno de la Akademio rilate la landnoman demandon. Mi deziras atentigi pri tio, ke iuj el ĝiaj membroj kontraŭas la aluditan manion. Mi, ekzemple, jam protestis tion forte, kaj sine de la Akademio kaj ekster ĝi. Jen iuj el miaj propraj argumentoj, tre similaj al tiuj de s-ro Weiss, kvankam pli ampleksaj:

La ĉefa motivo por enkonduki *-io* kiel sufikson landnoman fariĝis la emo al "interna-cieco". Kiel mi jam montris, tio konsistigas postrestaĵon de la imperiismo kaj kondukas al tendenco Naturalisma, kontraŭa al la spirito de Esperanto. Krom tio ĉi deziro, efektive subjektiva, ekzistas neniam bonaj argumentoj.

Sed oni ja asertas, ke evidentas la netaŭgeco de *-ujo* kaj la kontrasta merito de *-io* el la triseculo trovebla ĉe la unue menciita. Tamen ne estas tiel. Efektive *-ujo* ne signifas, kiel oni supozas, "lando", "arbo" kaj "enhavilo". Ĝi fakte havas, per si mem nur unu sencan, nome "kio enhavas". La precizigon pri la koncernataĵo venas el la *kombino* de la sufikso *-ujo* kun la antaŭa radikoj. Praktike tiaj kunmetoj nuntempe jam ne inkluzivas la arbojn. Aktuale oni diras *pirarbo* anstataŭ *pirujo*, k.s. Ekzistas do neniam konfuzeblo. La argumento montriĝas ege falsa.

Nun ni konsideru *-io*. Kontraŭ la fono de la antaŭa paragrafo oni certe rajtas atendi, ke ĝi evidentiĝos sian superecon, mem estante nepre unusenca. Sed kion ni trovas? Esploro pruvas, ke ĝi havas — ho ve! — multegon da funkcioj, entirante nin profunde en la marĉon de la Naturalismo; ĉar tromplumo ĝi estas.

En mia esploro mi trovis almenaŭ dek sencojn por *-io*, sendube rekordo. Jen:

1. Post la plej diversaj pseŭdoafiksoj grekdevenaj ĝi indikas *sciencan*, ekzemple (a) *-grafio* (geografo — geografio), (b) *-metrio* (geometro — geometrio), (c) *-nomio* (astronomo — astronomio), (d) *-ologio* (biologo — biologio). Laŭ PIV ekzistas krome formoj finiĝantaj per *-krato/kratio*, *-mato/matio*, *pato/patio*, *-tom/tomio*, *-urg/urgio* kaj *-zof/zofio*, kiujn mi tamen ne pluesploris.
2. Aliflanke ĝi celas ankaŭ *malsciencan*, kiel en astrologo — astrologio.
3. Ĝi povas aludi *teknikon* laŭ ĝia karakteriza instrumento: mikroskopo — mikroskopio, stetoskopo — stetoskopio, telefonio — telefonio.
4. En kelkaj vortoj grekdevenaj ĝi koncernas la *politikon*, interalie post la jenaj elementoj: *-agogo* (demagogo — demagogio), *-arĥo* (monarĥo — monarĥio), *-krato* (demokrato — demokratio).
5. Ekzistas kazoj en kiuj *-io* diferencigas inter urbo kaj lando, jene: Luksemburgo — Luksemburgio, Meksiko — Meksikio.
6. Iufoje, tamen, la supra distingo aperas ankaŭ en la formo de mala tipo: Brazilo (lando) — Brazilio (urbo).
7. Alia diferencigo estas inter lando kaj riveronomo el kiu ĝi devenas: Niĝero — Niĝerio.
8. En la tabelvortoj *-io* estas vortfino kun ege alta frekvenco, kiel ĉe tio, kio, k.t.p.
9. Potenciale iuj funkcioj de *-io* povas konflikti ankaŭ kun la infinitiva *-i*. Ne maleblas tio, ke iam la aŭtoroj sentos bezonon krei el verboj formojn kiel *dormio*, *laborio*,

k.t.p., por speciala nuancigo ne ebla per *dormo* kaj *laboro* aŭ *dormado* kaj *laborado*.

10. Plej grava, tamen, estas tio, ke ekzistas tute alia kategorio de landnomoj, pli ol 30 laŭ Montagu C. Butler (*Esperanto-English Dictionary*), kiuj simile sed ne same finiĝas per *-io*, kiu ĉe ili tamen — ni notu tion bone — ne estas sufikso, nur la lastaj du sonoj/literoj en vorto nedisigebla. Ilin oni ne kreas el radikoj popolnomoj. Ekzemple, loĝanto de *Ĉilio* ne estas *Ĉilo* sed *Ĉiliano*, kontraste kum *Hispano* troviĝanta en *Hispanujo*.

Ĝuste por ne konflikti kun tiu ĉi lasta nesufiksa tipo de landnomoj, *-io* ne devus esti alternativo aŭ anstataŭigo por *-ujo*. Se ni akceptus, apud vorto kiel *Hispanujo*, ankaŭ *Hispanio*, ni perdus klaran kaj necesan distingilon. La esperantistoj jam ne scius, ĉu enloĝas la du landojn supre menciitajn *Ĉilioj* kaj *Hispanoj* aŭ *Ĉiliano* kaj *Hispanianoj*.

Sed ĉu la problemoj ne solveblas per la simpla forigo de ĉiuj simplaj formoj kiel *Hispano*? Tiukaze *Hispaniano* ne estus konfuza. Certe, sed tia solvo estas malebla. Ni ne povas, kaj ne rajtas, peŝi la simplajn vortojn el la lingvo. Tion la Esperanta popolo — pli saĝa ol la reformistoj — simple ne akceptus. Krome la procedo rezultigus aliajn problemojn.

Unu estas, ke iuj popolnomoj ne rilatas al lando, ekzemple *Buroj*, *Ciganoj* kaj *Judoj*. Ekzistas nenie sur la tergloblo ŝtatoj kiel *Burio*, *Ciganio* kaj *Judio*. La laste menciita povus maksimume havi ian validon nur en perspektivo historia. Tiaj vortoj kiaj *Buro*, *Cigano* kaj *Judo* do fariĝus neregulaĵoj.

Sed tie ne haltas la afero, ĉar aliaj popolnomoj ne koincidas kun unuopaj landoj. *Arabojn*, ekzemple, oni ne trovas nur en *Arabujo*. Krome naskiĝas homoj parolantaj certan lingvon kaj kun specifa kulturo ankaŭ en lando fremda, eĉ se ili havas sian propran. Tiaj estas inter aliaj la *Grekoj* en Sud-Afriko, kaj multloke. Se ili akceptas la civitanecan de alia ŝtato, konservante tamen siajn lingvon kaj kulturon — eĉ per propra komunumo — ili ne estas *Grekianoj*. Ili restas malgraŭe, propravole, *Grekoj*.

La ĉiam pli larĝan uzadon de *-io* mi konsideras unu el la gravaj kialoj por la kaoso landnoma. Alimetafore: ĝi ne estas medikamento sed parto de la malsano.

Mi tial ne povas ne bedaŭri la decidon de la Akademio nuligi sian antaŭan malaprobon al *-io*.

— Edwin de Kock

BICIKLOS AL SUD-AFRIKO

En Decembro 1986 ekvojaĝis el Francujo aventurema paro, kiu klopodos bicikli tra la tuta Afriko, de Alĝerio ĝis nia lando. Ili estas Dimitri Dupré kaj Gloria Maniette, kiuj kalkulis alveni ĉi tie ĉirkaŭ Junio aŭ Julio 1988, kaj deziras gastigon. Bonvolu helpi ilin ĉe ilia alveno. Bedaŭrinde mankas intertempa respondadreso. Eble ie en la ĝangalo . . . ?

PLI PRI ESPERANTAJ SIMBOLOJ

EN la antaŭa numero de nia revuo estis invito komenti pri Esperantaj Simboloj.



Bestoj, plantoj aŭ floroj kiel naciaj simboloj rilatas al specimenoj tipaj por la koncernaj landoj aŭ regionoj. La preskaŭ centjara simbolo de Esperanto validas tiel same en la norda Gronlando kiel en la meza Saharo.

Nia verda stelo, pentagramo, estas unu el la plej noblaj simboloj. Ĝi enhavas la slosilon de la *sekcio dia*, la *ora proporcio*, jam de la Kreinto prezentata en la naturo, en la beleco de plantoj kaj floroj.

Bazitaj sur tiuj modeloj, famaj majstro-konstruistoj uzis la pentagramon kaj la oran proporcion en la desegnoj de temploj kaj katedraloj, kies belecon ni ankoraŭ povas admiri.

La pentagramo ankaŭ enhavas la simbolon de la homo en harmonio kun la universo. Ni krome povas vidi en ĝi la kvin kontinentojn; kun la verda koloro ĝi reprezentas la esperon. Ĉu povus ekzisti pli taŭga simbolo por la *Lingvo Internacia*, kiu kreskis el amlaboro de ĝia iniciatinto? Li dediĉis praktike ĉiun liberan horon de sia vivo, esperante ke nia lingvo helpas gvidi la homaron al pli bona interkompreno kaj harmonio.

— H.W. Appel



LA HOMO EN HARMONIO
KUN LA UNIVERSO

LA SEKCIO DIA
LA ORA PROPORCIO

AB: AC = AC: (AB k AC)
DE: AD = AD: (AD k DE)
: AD: DC
: 1: 1,62

FIG. 5 montras ankaŭ kiel oni povas fari kvinangulon per uzo de gradarko.

OBJEKTOJ KUN LA NOMOJ ESPERANTO KAJ ZAMENHOF

EN 1986 troviĝas 555 objektoj en 33 landoj sur 5 kontinentoj, kiuj havas la nomojn aŭ *Esperanto* aŭ *Zamenhof*. Ili inkluzivas stratojn, pontojn, montojn, ĝardenojn, placojn, monumentojn, ne-esperantistajn librojn kaj eĉ ŝipojn.

Aldone, 2 asteroidoj inter Marso kaj Jupitero nun havas oficiale la nomojn *Esperanto* kaj *Zamenhof*.

Do entute 557 objektoj.

En Sud-Afriko nun troviĝas 8:

Johanesburgo 1, Pretorio 2, Pietermaritzburgo 2, Kempton Park 1, Ceres 1, Port Elizabeth 1. Ĉi lasta urbo eble akiros ankaŭ *Zamenhof-straton* en 1987.

(Ensendis *Cobus Zeelie*, surbaze de informo kiun havigis s-ro Röllinger, Germanujo, kaj lokaj esperantistoj.)

REDAKCIA NOTO: Estus interese ricevi de niaj legantoj ankaŭ aldonajn informojn, ekzemple pri Esperantaj nomoj por ilia loĝejo, k.t.p. Ekzemple, kiam mi ankoraŭ estis ĉe Port Elizabeto, mi rimarkis, ke Adèle kaj siaj parencoj havas hejmon kiun ili nomis *Nia Domo*, dum la tabulo ĉe la enirejo al mia farmeto tekstas *Diadone*, kiu ankaŭ aperas en miaj poemaroj.

AL EDWIN KAJ RIA

Mi pensas, ke ridete Dio donis ĉe fajra bronzpordego de Edeno etan manplendon da ĉielo, pecon da paradizo, por ilumini sombron — vian amikecon.

Mi ĝoje spertas, ke apud montetoj Mahalisberĥ, sub arko de somera


ŝtormĉielo troviĝas mielnesto,
la dolĉo de ĉi Kristanima
ĉarma belĉeesto.

Kelkfoje se mi vagas, erarlume,
serĉante bonakordan idealon,
eĉ tra alies frosta senapreco
ankoraŭ brilas – ĉiam stelegale –
varma konstanteco.

Diadone
Mielnesta Monteto
Bona Akordo
Sud-Afriko

Kristmasko 1986

– ARNO KUCHARZIK



VIZITO AL ĈINIO – JULIO/AŬGUSTO 1986

La 71a Universala Kongreso de Esperanto okazis ekde la 26a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1986 en la ĉina ĉefurbo Pekino. Tio vere nun nomiĝas Beijing, la nomo kiun ĝi havis antaŭ jarcentoj, sed pro kialo nekonata al mi oni uzis la nomon Pekino por la Kongreso.

La kongresejo estis en la Bejinga Amikeca Hotelo, kiu estas grandega hotelo konsistanta el kelkaj konstruaĵoj. Mi devis manĝi en alia konstruaĵo ol tiu en kiu mi dormis. Tio ne ĝenis min, ĉar neniam pluvis kiam mi estis ekstere.

La Solena Inaŭguro kaj Malfermo de la Kongreso okazis dimanĉon la 27an de julio en la Ĉina Teatrejo, granda, impona, moderna teatro ne grandan distancon for de la kongresejo. Tiuj okazintaĵoj estis formalaj kiel kutime. Eble pro tio mi rimarkis, ke posttagmeze ĉeestis pli malmultaj homoj ol matene. Por mi, tamen, la Kongreso komenciĝis la antaŭan vesperon kiam, ĉe la sama loko, okazis Folkloro Vespero. Tie mi vidis dancistojn, akrobatojn, kantistojn, k.t.p. La programo estis tute eksterordinara kaj ege ĝuinda. Nur la lasta ero, la “Pekina Opero” estis tro longa kaj teda.

Mi devas konfesi, ke mi ĉeestis nur unu kunvenon de la komitato de UEA. Paginte tiom da mono por atingi la landon, kaj kun malmulte da tagoj disponeblaj,

DODOJCE PRI ADRESOJ

La inter ni leteroj,
eĉ pli sen gal’ aŭ mordo,
ĉi-flanke trafos min en
Bona Akordo.

Ni laste relokiĝis
en Mielnestan Klifon,
abele postmigrantaj
dolĉan signifon.

3.3.1983

En *Saluton al la Suno*

– *Edwin de Kock*

Dodojco: Antikva Japana versformo
popola. Mia farmeto *Diadone* situas
en *Honingnestkrans*, kiu Nederlande
signifas *Mielnesta Klifo*. Mia poŝta
adreso tamen estas ĉe *Bon Accord*,
13 km for. Ĝi estas apenaŭ urbeto.

mi opiniis, ke estas pli valore ekskursi ol kunveni.

Mi faris entute kvin ekskursojn al la Placo Tian An Men, la Imperiestra Palaco, Lamaista Palaco, k.t.p. Ĝenerale ili estis bone organizitaj. Tamen iufoje matena ekskurso finiĝis nur kvin minutojn antaŭ la komenciĝo de posttagmeza ekskurso, kaj tiuvespere mi tre lacis. Tiam, same kiel en kelkaj aliaj okazoj, mi pasigis parton de la vespero ĉe la hotelo kie, je la supro, troviĝis trinkejo. La biero kaj vino estis bonaj kaj malmultekostaj.

La ĉiĉeronoj estis tre helpemaj sed parolis la anglan pli bone ol Esperanton. Tio ne ĝenis min, sed ja kelkajn aliajn kongresanojn. Mi rakontu ion. Dum ekskurso la ĉiĉerono petis permeson rakonti ŝercon. Ĉiuj en la aŭtobuso jesis. Sed kiam li diris, ke li devas paroli anglalingve, kelkaj pasaĝeroj plendis. “Sed mi ne povas eldiri ĝin Esperante,” diris la ĉiĉerono. Jen, do, la netradukebla ŝerco:

Demando: Kial biciklo ne staras rekte per si mem? *Respondo:* Ĉar ĝi estas “too tired” (two-tyred)!

Espere, ke estontaj organizantoj de Kongresoj legos ĉi tion, mi diru nun, ke ne ĉiu homo ŝatas la teatron. Post iu ekskurso la aŭtobuso venigis nin al la teatro, ne al la hotelo, kaj mi plendis pro tio, ke mi estas tre laca kaj ne volas vidi la teatraĵon. La ŝoforo klarigis, ke li ne povas veturigi al la hotelo malpli ol 11 homojn (mi ne scias kial). Estis tre facile trovi pli ol tiun nombron da pasaĝeroj, do ni revenis al la hotelo. Mi opinias, ke la Kongresaj organizantoj ne rajtas supozi, ke ni ĉiuj subtenas “kulturajn” aferojn.

La plej ĝuinda afero estis la vizito al la Granda Muro. Nin veturigis proksimume 50 aŭtobusoj karavane, kun policeskorto kaj eĉ helikoptero. Ĉe la loko kie ni estis (Badaling), la muro estas restaŭrita; kaj dum horo mi promenis sur ĝi. Krom la 1500 esperantistoj, ankaŭ estis tie amaso da ĉinoj. Tre malofte mi antaŭe mi vidis tiom da homoj vizitantaj la saman lokon samtempe. La ĉinoj komencas lerni la “okcidentajn” kutimojn: ĉe ĉiu turista loko troviĝis budoj kie oni vendis memorigaĵojn je nur frakcio de tiom kiom ili kostus alilande.

Pri la seriozaj Kongresaferoj oni povas legi en *Esperanto* aŭ iu alia revuo. Mi nur diru, ke la nova Prezidanto de UEA estas Humphrey Tonkin, kiu jam antaŭ kelkaj jaroj plenumis tiun pozicion. Li estas tre kapabla homo, kaj mi konis lin jam pli ol 25 jarojn, ĉar ni venas el la sama parto de Anglujo, kaj mi renkontis lin unuafoje kiam ni ambaŭ estis multe pli junaj ol ni estas hodiaŭ.

Kion diri pri la lando Ĉinio?

En la urbo Pekino ĉie oni vidas novajn apartamentarojn. Oni ankaŭ konstruas multegajn novajn grandajn apartamentarojn. Tamen ankoraŭ estas manko de loĝejoj. La ĝeneralaj vivkondiĉoj ŝajnis al mi similaj al tiuj en aliaj Komunistaj landoj. La homoj havas laboron, loĝejon, vestojn kaj sufiĉe da manĝaĵoj. Ili ĝenerale estas feliĉaj, ĉar ne dolorigas la manko de tio kion ili neniam havis. Mi rimarkis ĉe iu fabriko, ke la prezo de Coca Cola egalas al la tagsalajro por la junulino kiu vendis ĝin al mi. La kosto de meztagmanĝo por tri en la Bejinga

Hotelo egalas al monata salajro por la kelnero. Mi tamen rimarkis, ke ĉie ajn kie mi estis mi vidis multajn ĉinajn turistojn, kaj preskaŭ ĉiuj havis fotilon. Preskaŭ ĉiu havas biciklon, ĉar ne estas permesate al la homoj, ke ili aĉetu aŭton, eĉ se ili havas la monon. Oni vidas multajn aŭtojn sur la stratoj, sed ili apartenas al firmaoj, lernejoj, k.t.p. La stratoj de Pekino estas larĝaj kaj multe okupitaj.

Laboristoj laboras ok horojn tage, ses tagojn semajne. Ĉe fabriko mi demandis pri la aĝo de kelkaj laboristinoj, ĉar al mi ili aspektis tre junaj. Sed fraŭlino kiu aspektis al mi esti 16-jara, vere havis 22 jarojn. Multfoje mi konstatis, ke la ĉinoj aspektas pli junaj ol ili vere estas.

Kiam mi estis en lernejo (antaŭ multaj jaroj!), oni priskribis la ĉinojn kiel popolon kiuj staras en la rizkampoj kun akvo ĝis la maleoloj. Je mia granda surprizo tio tute ne ŝanĝiĝis. Ĉe loko kie oni konstruis, por aliloki brikojn, oni simple metis ilin en ĉareton kaj tiris ĝin per la manoj.

Kun 1050 milionoj da enloĝantoj Ĉinio devas limigi la nombron da naskitoj. Ĝenerale geedza paro rajtas havi nur unu infanon. Se ili mem ne havas gefratojn, ili rajtas havi du infanojn. La homoj estas afablaj, kaj por mi estis plezuro viziti tiun ekzotikan landon.

– Colin Beckford



APERIS LA KOLEKTITAJ POEMOJ DE NEWELL

SENDUBE pri tio interesigos la poeziamantoj, ke finfine aperis unu el la plej gravaj libroj kiuj ankoraŭ mankas al nia literaturo: plena kolekto de la originalaj poemoj far Len Newell (1902.12.23 – 1968.11.08). Jen la detaloj:

Nova libro de ESPERANTAJ KAJEROJ

Kolektitaj Poemoj de L.N.M. Newell

Editoris Edwin de Kock

Paĝoj (i-viii) 1-80

Formato 210 x 148mm

Kovrilbildo: laŭ pentraĵo de Vanessa Jackson

Foto de Newell

Antaŭparolo, biografio, bibliografio k.t.p. de E. de Kock

Kun ĉiuj esperantaj poemoj de Newell, el kiuj multaj

neniam antaŭe presitaj

Kun appendico de kelkaj el liaj anglalingvaj poemoj

£3,60 (rabato de 33,3 elcento por minimume tri ekzempleroj)

HELPOPETO PRI NEOLOGISMOJ

ELDONOCELE mi surkartigas neologismojn, t.e. vortojn ne oficialajn, ĉefe la neaperintajn en *Plena Vortaro* sen la *Suplemento*. La verko, kiun mi deziras prepari, verŝajne havos la titolon *Literatura Vortaro*. En mia kolekto troviĝas jam ĉirkaŭ 2500 kartoĵoj, kun probable 10 000 apartaj eroj. Mi jam utiligis pli ol 150 fontojn, precipe postlibrajn glosarojn, kvankam iujn verkojn mi speciale traserĉis tutajn. Nur la vortarojn mi ankoraŭ ne uzis multe, estantajn fontoj sekundaraj.

La projekto celas kaj legantojn kaj verkistojn de nia literaturo, sed potenciale eĉ nian Akademion. Enestos ne nur la neologismoj mem. Mi klopodos indiki ankaŭ la jaman uzitecon de la vortoj, rilate al aŭtoroj, la koncernaj libroj kaj en kiom da fontoj ili aperis.

Per tio oni povos multon ekscii, ekzemple ĉu iu formo meritas eventualan oficialigon, imiton, neglekton aŭ eĉ ialan eviton. Temas, fakte, pri projekto kiu povus esti signifa por la plia koherigo kaj estonta evoluo de nia literatura lingvo – kaj tial de Esperanto mem.

Tamen ne eblas por unu persono prepari verkon tiel ampleksan. Mi do bezonas, kaj petas, helpon, precipe de:

1. *Bona Eldonisto*. kiun mi kompreneble povos serĉi poste, sed kiu ankaŭ povas sin proponi jam anticipe. Ĉar temas pri vortaro, ĝi devos havi kovrilojn fortikajn.

2. *Verkistoj*. Ili bonvolu sendi al mi siajn listojn, en kiuj aperu krom la vortoj mem, ankaŭ: (a) La titolo(j), eldonisto(j), dato(j), k.t.p. de la koncernaj libro(j); (b) la aŭtoraj difinoj; (c) aliaj eventualaj atentigoj, ideoj, informoj aŭ konsiloj kiuj povus utili. (Nur unu specon de reago mi tute ne deziras, kaj ne respondus: leterojn en kiuj oni simple esprimas sian malamon kontraŭ neologismoj. Tio tute ne povas koncerni ĉi tiun projekton.)

Se verkisto ial ne povas informi pri siaj verkoj unuope, laŭ 2 supre, oni tamen bonvolu sendi sian liston, eĉ se nur partan aŭ iudetale nekompletan. Sed gravas unu punkto antaŭ ĉio: Oni ne enmetu nurajn *proponojn*. Ĉiu vorto devas esti formo kiu efektive estis uzita en iu verko jam aperinta ie, libre (aŭ eĉ revue).

Bonvolu sendi la respondon al: *Edwin de Kock, Posbus 902-143, Bon Accord, 0009, Respubliko de Sud-Afriko.*

Reaperigo en aliaj revuoj estas speciale petata.




DU GRAVAJ ARTIKOLOJ

DUM 1986 aperis du gravaj artikoloj pri Esperanto en revuoj de nia lando. Kopiojn ni kunsendas al la Sud-Afrikaj legantoj, kiel apartajn aldonajojn.

Unu estas tripaĝa, el la plumo de nia estimata samideano d-ro (iam profesoro) Nico van der Merwe, kiu laboras por nia ŝtata servo, fako jurista instruado. Tion oni publikigis en *Nuntius*, la jara eldono, celanta liajn samfakulojn.

La alia estas dupaĝa, kaj aperis en *Die vlieënde springbok*, revuo de nia aerservo, far neesperantisto, kiu montriĝas precize kaj bone informita.



LOGIKAJ ENIGMOJ

POST la morto de s-ro Zdenek Stifter (vidu nekrologon), lia frato donacis al mi la tutan stokon de Esperantaj libroj kiujn li postlasis. Kelkajn el tiuj libroj mi ŝatus havigi al aliaj membroj. Anstataŭ simple disvendi la librojn je la kredito de SEA, mi preferas aperi serion da enigmoj, kaj la librojn mi donos kiel premiojn al sukcesplenaj solvontoj. Mi petas, ke ĉiu solvanto kunsendu kun ĉiu solvo la sumon de 50 cendoj, kion mi transpagos en la kason de SEA. Tiamaniere, se la membroj bone subtenos, ni eble enspezigos pli ol per nura disvendo.

La unua enigmo sekvas. Mi petas, ke vi ensendu solvojn rekte al mia adreso (*Poŝtfako 31186, Torjusdal, 0134*), por atingi min plej malfrue unu monaton post la apero de tiu ĉi numero de nia revuo. Al la membro kiu ensendas ĝustan solvon, aŭ la plej ĝustan, mi sendos liston de la libroj de s-ro Stifter, el inter kiuj la membro povos elektri tri librojn. Se pli ol unu ĝusta solvo estos ricevita, oni lotumos. Tiel ĉiuj libroj estos donataj kiel premioj de sekvontaj enigmoj.

Bonvolu noti, ke eĉ se oni ne sukcesas trovi la tutan solvon, oni tamen ensendu ĝin, ĉar ĝi povas esti la plej ĝusta! Se jes, ĝi gajnos la premion.

Aperos enigmoj malsamspecaj, por plaĉi al diversaj gustoj.

ENIGMO 1

KVIN esperantistoj renkontiĝas ĉe Universala Kongreso. En la daŭro de ilia babilado, montriĝas, ke ĉiu el ili nur unufoje antaŭe partoprenis kongreson. Ankaŭ montriĝis, ke krom Esperanto kaj la gepatra lingvo, ĉiu el ili parolas ankaŭ alian fremdan lingvon.

El la subaj gvidiloj, ĉu vi povas konkludi kiu kongresano ĉeestis kiun antaŭan Universalan Kongreson, kaj kiun lingvon ĉiu parolas krom Esperanto?

Por iomete helpi al vi, kaj por klarigi kiel solvi la enigmon, mi enskribis en la reton la konkludojn tireblajn el la unuaj du gvidiloj. Bone konsideru miajn enskribojn: ĉiu ✓ signifas *jes*, kaj ĉiu X signifas *ne*.

	1977	1979	1981	1982	1985	hispana	islanda	itala	rusa	ĉina	Sud-Afriko	Germanujo	Francujo	Belgio	Usono
S-ro Leono								X							
S-ro Urso								X							
F-ino Vulpino					X			X							
S-ino Lupino	X							X							
S-ro Leporo	X				X	X	X	✓	X	X					X
Sud-Afriko											X				
Germanujo											X				
Francujo											X				
Belgio											X				
Usono						X	X	X	X	✓					
hispana															
islanda															
itala	X				X										
rusa															
ĉina															

	Kongreso	Lando de deveno	Alia lingvo
S-ro Leono			
S-ro Urso			
F-ino Vulpino			
S-ino Lupino			
S-ro Leporo			itala

1. S-ro Leporo, kiu scipovas la italan, ĉeestis kongreson antaŭ tiu kiun ĉeestis s-ino Lupino, sed post tiu kiun ĉeestis f-ino Vulpino. (Tio konkludigas, ke neniu alia persono scipovas la italan, ke s-ro Leporo ne parolas alian lingvon, ke s-ro Leporo kaj f-ino Vulpino ne ĉeestis la laste menciitan kongreson, ke s-ro Leporo kaj s-ino Lupino ne ĉeestis la unue menciitan, kaj ke la persono kiu scipovas la italan, ne partoprenis la lastan kaj la unuan kongreson.)
2. La persono, kiu venas el Usono, parolas la ĉinan. (El tio oni povas konkludi, ke neniu alia persono parolas la ĉinan kaj ke s-ro Leporo ne devenas el Usono.)
3. La virino el Sud-Afriko esperantistiĝis en 1980, kaj ĉeestis kongreson en Eŭropo.
4. Tiu kiu partoprenis la kongreson en Lucerno instruas la rusan lingvon ĉe universitato.
5. "Antaŭ ol mi estis en Antverpeno, mi neniam vidis Eŭropon," diris unu kongresanino.
6. S-ro Urso ne vivas en Belgio aŭ Francujo, kaj ne scipovas la rusan aŭ la hispanan.
7. La sinjoro kiu scipovas la islandan lingvon ne loĝas en Belgio aŭ Francujo.
8. La persono el Usono raportis kun ĝuo pri sia antaŭa ĉeesto en Aŭgsburgo.
9. La kongresano kiu ankaŭ partoprenis en Brazilio ne loĝas en Francujo.
10. S-ro Leono esperantistiĝis nelonge post la kongreso en Rejkjaviko.

— Jan Strydom

JUDAJ FESTOJ

En la antaŭa numero Bona Espero aperigis artikolon pri la Pasko, unu el la Pilgrimfestoj.

DUM Junio 1986 la 13an kaj la 14an okazis alia Pilgrimfesto, Ŝavu'ot. La Hebrea nomo signifas *Semajnoj*. Ekde Pasko ni nombras 49 tagojn, do 7 semajnojn, kaj la postan vesperon komenciĝas Ŝavuoto.

Laŭ la tradicio Paskon la Judoj aŭdis, ke post sep semajnoj ili ricevos la Toraon. Ili tiel antaŭĝojis, ke ili

senpacience nombris la tagojn, dirante: "Restas unu tago malpli!" kiel infano antaŭ la datreveno de la naskiĝtago.

Alia kialo por ligi la du festojn estas, ke dum Pasko ni ricevis fizikan liberecon kaj dum Ŝavuoto spiritan.

La vesperon antaŭ Ŝavuoto ni manĝas laktajn pladojn, ĉar nur la postan tagon ni ricevis la Toraon, kiu diras kian viandon ni rajtas manĝi. Speciala frandaĵo de Ŝavuoto estas flano plenigita per blanka fromaĵo — tre bongusta.

— Oskaro Sher

KONTRIBUAĴO POR VORTARO DE ESPERANTAJ MALLONGIGOJ, SIGLOJ KAJ AKRONIMOJ

Listo de Mallongigoj (Saarbrücken, 1982), kompilita de Reinhard Haupenthal, estas publikigaĵo utila por ĉiuj esperantistoj, kiuj deziras orientiĝi en la ĉiam pli vastiĝanta maro da mallongigoj uzataj en Esperantujo. Mi jam verkis kelkajn artikolojn pri tiu temo⁽¹⁾ por kritiki la t.n. siglomanion (trouzo de mallongigoj), ĉefe, kiam mankas klarigo de la signifo. Tamen, la nombro de mallongigoj, sigloj kaj akronimoj⁽²⁾ daŭre kreskas kaj minacas malfaciligi la komprenon de tekstoj en la zamenhofa lingvo, ĉar, efektive, ĉiu estas la ekvivalento de nova vorto. Se ili ne troviĝas en konsultlibroj kiel *Plena Ilustrita Vortaro* (PIV) aŭ en etnolingvaj Esperantaj vortaroj, oni devas rigardi ilin kiel neologismojn, kiuj bezonas glosadon. *Listo de Mallongigoj* estas pionira verko celanta la sisteman registron de tiuspeca lingva materialo, sed mi opinias, ke devas aperi pli kompleta verko, vera vortaro, kiun unu persono apenaŭ povas kompili. Tio estus ideala tasko por aktiva Akademio de Esperanto, sed se tiu organizaĵo ne kapablas entrepreni la redakcion, aliaj devas fari la laboron.

Ĉi-sube mi prezentas modestan kontribuon aldonendan al *Listo de Mallongigoj*. Mi kolektis la donitaĵojn tre rapide dum mallonga tempo en eksperimenta maniero por akiri ideon pri kiom da materialo ekzistas, kiu mankas en la kompilaĵo de s-ro Haupenthal. Mia listigo neniel estas kompleta, kaj post ankoraŭ du aŭ tri horoj da foliumado de periodaĵoj kaj libroj mi verŝajne povos duobligi la kvanton. Mi ne aranĝis mian materialon laŭ unu alfabeto ordo por la tuto sed laŭteme por povi pritrakti kelkajn aspektojn de la formado kaj uzado de kelkaj mallongigoj. Mia opinio redaktantoj de la vortaro de mallongigoj devas ne nur registri sed ankaŭ provi fari ordon, ĉefe malrekomendante siglojn havantajn la saman formon kun pluraj signifoj, kaj kreante novajn mallongigojn por anstataŭi tiujn, kiuj estas ambiguaj. Eble ili povos ankaŭ starigi principojn por formi mallongigojn de novaj vortoj kaj titoloj, tiel ke ili konformos simetrie al aliaj mallongigoj apartenantaj al la sama kategorio.

A. Fakorganizaĵoj. Ili kreskas ĉie kiel fungoj post pluvo, kaj ili estas same efemeraj, lasante post si nur siglojn, kiuj devas esti registritaj. Jen deko da novaj organizaĵoj:

BEL	—	Bahaa Esperanto-Ligo
BEMI	—	Biciklista Esperantista Movado Internacia
EGLI	—	Esperantista Go-Ligo Internacia
EVA	—	Esperantlingva Verkista Asocio
IAdEM	—	Internacia Asocio de Esperantistaj Matematikistoj
LSG	—	Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

- NBN – Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturato
- PEM – Por-Esperanta Mormonaro
- SRES – Scienca Rondo de Esperantistaj Studentoj
- TEVA – Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio

Estas rekomendinde formi siglojn, kiuj estas facile prononceblaj same kiel vortoj: ekzemploj estas BEL kaj EVA. Alie estas necese prononci ilin laŭ la nomoj de la literoj kiel “losogo” (LSG) kaj “nobono” (NBN).

B. Landaj asocioj kaj sekcioj. Lastatempe fondiĝis pluraj novaj organizaĵoj en diversaj landoj. Inter ili estas la sekvaj:

- AES – Asocio de Sovetiaj Esperantistoj
- AESSR – Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko
- FEB – Federacio Esperanta en Bharato (Hinda Unio) ¹
- GDREA – Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko
- IA – Islanda Esperanto-Asocio
- JEL – Jugoslavia Esperanto-Ligo
- JELI – Junulara Esperanto-Ligo Israela
- LEA – Luksemburga Esperanto-Asocio
- PakEsA – Pakistana Esperanto-Asocio
- PEA – Perua Esperanto-Asocio

Okulfrapa trajto de tiu ĉi kategorio estas la ofteco de pluraj sigloj kun po du aŭ tri signifoj, ekzemple LEA. Estas eble eviti tiun ambiguecon, se la ordo de vortoj en la titolo de la organizaĵo estas modifita laŭ la sekva ekzemplo:

- LEA – Laborista Esperanto-Asocio
- EAL – Esperanto-Asocio de Libano
- ALE – Asocio Luksemburga de Esperanto

C. Diverscelaj specialaj organizaĵoj. En tiu ĉi grupo troviĝas semajnfinaj seminarioj, someraj universitatoj, sciencaj kaj kulturaj simpozioj, someraj renkontiĝoj kaj tendaroj, kaj organizaĵoj de fakuloj.

- AEST – Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko
- BET – Balta Esperanto-Tendaro
- GEP – Gastejo Edmond Privat
- IREN – Internacia Renkonto Naturamika
- IEI – Internacia Esperanto-Instituto
- ITRE – Internacia Turisma Renkontiĝo de Esperantistoj (en) Ercmontaro
- SIA – Semajno de Internacia Amikeco

- SUK – Someraj Universitataj Kursoj
- TUSE – Turisma Semajno en Slovaka Paradizo
- VEF – Vintra Esperantista Ferio

D. Periodaĵoj. Ankoraŭ unu riĉa fonto de sigloj kaj mallongigoj estas la nomoj de revuoj, gazetoj kaj bultenoj eldonitaj en Esperantujo.

- BI – Budapeŝta Informilo
- HFM – Hungara Fervojista Mondo
- IE – Israela Esperantisto
- JA – Juna Amiko
- LF – Literatura Foiro
- LKK – La Kancerkliniko
- LKKK – La kromkancerkliniko, la Kancerklinikokrestomatio
- PL – Planlingvistiko
- SER – Svisa Esperanto-Revuo
- TAE – Transalpa Esperantisto

E. Generale uzataj mallongigoj. Mi ne povas listigi tie ĉi ĉiujn mallongigojn troveblajn en fakaj tekstoj, bibliografiaj referencoj kaj alispecaj literaturaj verkoj, kiuj ankoraŭ ne estas registritaj en *Listo de Mallongigoj*. Mi preferas rimarkigi tiujn, kiuj estas ambiguaj, aŭ al kiuj mankas ero de paro, aŭ kiuj bezonas modifon pro alia kialo.

- Ak. – Akademio
- Ak-ano – Akademiano
- Ak-anino – Akademianino
- d-ro – doktoro
- d-ino – doktorino
- d-rino – doktorino (mi ne rekomendas tiun ĉi formon, sed ĝi estas uzata same kiel *d-ino*)
- f-lo – fraŭlo
- f-ino – fraŭlino
- ing. – ingeniero
- ing-ino – inĝenierino
- k-do – kamarado
- k-ino – kamaradino
- Mag. – magistro
- Mag-ino – magistrino
- k.s. – kaj simila(j), kaj simile

- k. sekv. – kaj sekvanta(j)
 kp. – komparu
 KP – Komunisma Partio
 PK – poŝkesto
 PF – poŝfako
 Red. – redaktoro
 Red-ino – redaktorino
 NdLR – noto de la redaktoro

La uzo de majuskloj aŭ minuskloj por la mallongigoj de titoloj de personoj kaj kelkaj aliaj vortoj estas arbitra.

NOTOJ

1. Siglomanio. *L'Esperanto*, 1983, n-ro 3, pĝ. 14-15.
 Mallongigita Esperanto. *Sabadell Esperantista*, 1983, n-ro 167, pĝ. 8-9.
 Verda alfabet-sup. *The Australian Esperantist*, 1983, n-ro 208(288), pĝ. 192-193.
 La problemo de enigmaj mallongigoj (aperonta)
2. *akronimo* – vorto aŭ nomo, konsistanta el la inicialoj aŭ unuaj silaboj de plurvorta nomo aŭ esprimo.
 Mi proponis specialan uzon de akronimoj en la sekva artikolo:
 "Landnomoj en la formo de akronimoj," *Informilo pri la Instrua Laboro*, 1984, novembro-decembro, pĝ. 10-11. Represita en *Esperantisto Slovaka*, 1986, n-ro 2, pĝ. 16, kaj en *Akademioj Studoj*, 1986, pĝ. 151-152, 157.

Reviziita: oktobro 1986

– Bernard Golden

ROZE

*Kvakeroj diras al Milton':
 "Prefere verku Paradizon
 Trovitan."*

1. Johano Milton. Puritan'.
 Dek mil kvinjamboj: "Paradizo
 Perdita". Rafinite trafa

latin-imita stil' irizas.

Burĝonas rozoj en la put'
 . . . el kiu ĉerpis Samaria
 virino – kiun ŝi renkontis?
 Pilgrimi reen al la fontoj,
 Maria roza, Krist' el akvo . . .
 Burĝonas rozoj en la put';

disfibrigante sekaj traboj
 de l' gruo

(apokrifa signo:

"vi trovos min, splitante lignon")

– sed rozoj iel malkongruaj,
 moderna speco, laŭ tiamaj
 kutimoj multe tro inflama . . .

Ĉar rozoj tamen evoluas:
 ne paradizo re . . . Pilgrimo
 progresas, restas provizora,
 ni provas rozojn . . .

AR-: "ia nombro da
 samspecaj objektoj, kiuj
 ne estas esence ligitaj
 inter si kaj ne prezentas
 kune iun unu ideon"^Z

2. Krepusk-radioj herbon kombas.
 Tombrondo. Kion ĝi rimarkas?
 Sunlumo tra l' tilioj ombras
 la nomojn, brilas nur – lunarke –
 la supraj kurboj, kvazaŭ ungoj
 de fingroj, kiuj – kion montras"
 Nu, supren, kompreneble . . . Sed

atentas rondo sub la monto,
 "ferondo", kie kreskas fungoj,
 marondoj, kie fiŝ' elfontis . . .

Sed kia magnetiz' inkrustas?

Turniĝu do: jen rozarbusto
 senhonte ruĝa kontraŭ l' tomboj
 ŝtonĉize blankaj, grizaj, brunaj,
 samformaj, plej modeste kune . . .
 Rozujo pala, ĉar sovaĝa:
 "Plej simple mi respondas: rozon."
 Jes, ili estis ja kvakeroj:
 "subrozaj" vortoj do, sekrete . . .

Jes, ili kredis l' anglan vere!
 Ke roz' aludas releviĝon,
 Eviĝon, elreviĝon . . . kredis
 je rozo, malo de arozo
 (pripenzu: OZ- malsano, AR-
 plej zamenhofe kiel supre):
 malakapari, maluzurpi,
 ne bari for de la najbar' . . .

Ĉu kredi tion? Serioze?

– Kris Long

KORESPONDI DEZIRAS – 2

S-ro John T. Dale Jr., 704 Sligo Creek Parkway, Takoma Park, Maryland 20912-5405,
 Usono – kun virinoj 25-40 pri la unueco de la homaro.

F-ino Joanna Karp, Witkowice 2, 96-140 Brzeziny, K. Lodzi, Pollando, 20-jara medicina
 studentino – pri floroj, kristaloj, dancado kaj kantoj.

S-ro Zoltano Kovačs, Ajka P.O. Box 49, Hungria H-8400, Hungarujo – pri Afrikaj temoj.
 Post kelkaj jaroj li volas traveturi la mondon bicikle, sub la devizo: "Helpu kaj savu Afrikon!"

S-ro Robert Roze, 133 bis, Avenue Joseph Gasquet, F. 83100, Toulon, Francujo, 55-jara –
 kun denaska parolant(in)o de la Afrikansa, pri kiu li volas ion ekscii, interalie per presajoj
 tiulingvaj. Li estas denaske Nederlanda.

F-ino Tina Seastrom, 14500 Roadrunner Way, San Antonio, Texas, 78249, Usono (eble
 ĵus edziniĝinta), 36-jara vegetarianino, kiu amas la naturon kaj havas intereson pri poŝtmarkoj –
 kun iu en Sud-Afriko, ankaŭ rilate al ĝeneralaj temoj.

MUROJ KONTRAŬ BARBAROJ

Vestopinton tiras kolera vento
el barbara nordo, kiun ni timas,
dum ĉendiĝas bunte tulipkandeloj
apud la vila', en paco. Sed ĉiam
svarmajn konscias Piktojn kaj Tatarojn
en aŭ apud provincoj jam kadukaj.

Nun, post pli ol tricent kaj tridek jaroj
ni denove konstruos nian muron,
jam elektran dratbarilon. Malgraŭe,
kiam transbruas la helikopteroj
kun niaj legianoj, ni rigardas
tiujn flortorĉojn, kies flamentoj flirtas
apud la anemono kaj la rozo
replantitaj bonorde fro ĝarden'
en kontinento kiu nun koleras
ĉi provincon lastan de l' imperio.

Ĉielfilece moŝta, Paŭ Wu Botha
diktas al la burokratoj misterajn
ideogramojn. Ĉu pri plia paco
cis nia muro? Sed la koro aŭdas
Piktajn batalkriojn, Tatarajn hufojn;
kaj el nova Konstantinoplo aŭ ŝtato
sude de Jangzi la sireno kantas,
intrigante por ni kaŭĉuke brulan
morton aŭ la tranĉilon, kiu gorgojn
seĝos, dum oni dancos — post nia cedo
avantaĝe al la fremduloj, iam
parencoj, kiuj volas per ni pagi
por la negocoj inter la barbaroj.

Sed ankoraŭ — ĉu tagojn aŭ jardekojn? —
la ĝarden' vilae, leĝoj el polvaj
cerboj ĉirkaŭ Justinian', forumo
pluatestos ĉe ĉi popol' kulturon
ordan, ne sen kruelo aŭ graci'.

Mur' elektra, sed vento ĝin transsaltas,
kaj memoro vidas barbarojn kiuj

iel trabreĉos ĉiun sekurilon
konstruitan el tim' kaj amo.

Ankaŭ
tion ni ne forgesas, ke ĉi-flanke
lekas siajn lipojn por nia sango
certaj proletoj, kiujn fervorigas
revo pri paradizo, kies paco
kaj senkrima abundo masonitu
nur per homsango kaj buĉita karno —
evangeli' de lasta Judprofeto.

Kiam niaj tulipoj estingiĝos,
la vilao estos ruino, pontoj
trarompitaj kaj tiu vojoreto,
kiun ni ĵetis trans la tutan landon
de montoj kaj riveroj, rubrestaj'.

Ĉu post jarcentoj iu nova gento
meze de l' rompo revos tie ĉi
por renesanci nian civilizon,
aŭ — se ne tio — pensos pri la ĉarmo,
kiu malgraŭ la mankoj estis ni?

1986.05.22

— Edwin de Kock

EKSEDZIĜO

Unue plej proksimaj ĉiun nokton
en la apuda varmo, kaj tra tagoj.
La aliaj' ne estis imagebla.
Sed nun interas jaroj, kontinentoj
kaj la duonplaneda oceano
kun bluo karokula — kaj amaro
kvaz' ĉiuj larmoj de perdita mondo.

1984.04.10

— Edwin de Kock

KLARIGOJ pri "Muroj kontraŭ barbaroj"

Pikto: Skota tribano de la Romia tempo.

Tataro: Popolano de Centra Azio en la tempo de la Ĉina imperio.

"Elektra dratbarilo": projekto de la Sud-Afrika registaro por forbari teroristojn kaj kontraŭleĝajn laboristojn el najbaraj landoj.

"ĉi provincon lastan de l' imperio": Sud-Afriko estis parto de unue la Nederlanda kaj poste la Brita imperio. Ĝi ne nur daŭrigas grandparte ties valorojn kaj vivmanieron, sed ankaŭ akiris de ili multajn metodojn kaj ideojn por la posta Apartismo. Eĉ la kreinto de la Respubliko kaj ĉefa heroo de la Apartismo estis eksporto de Nederlando, ĉar tie naskiĝis ĉefministro d-ro Hendrik Frensch Verwoerd!

"Paŭ Wu Botha": P.W. Botha, Sud-Afrika ŝtatprezidanto, kies neklaraj reformo-projektoj iufoje konfuzas kaj timigas liajn samlandanojn.

cis: maltrans

"Konstantinoplo aŭ ŝtato sude de Jangzi": Post la falo de la okcidenta imperio, tiu urbo en la orienta parto longe pludaŭris kaj ne lasis Romon aŭ la barbarojn trankvilaj. Per siaj intervenoj ĝi multe kontribuis al la malordo kaj fina ruiniĝo. Similaĵojn spertis ankaŭ la Ĉina imperio.

"Leĝoj . . . Justinian": Grandparte la Sud-Afrika juro estas bazita sur la Romia, brile kunordigita en la tempo de tiu imperiestro, kaj la Nederlanda.

"Kaŭĉuke brulan morton": En la perforta tempo ĉirkaŭ la mezaj okdekaj jaroj, la "kamaradoj" (sia propra nomo por si) ofte mortigis siajn kontraŭulojn inter la nigraj homoj per tiu metodo. Unue ili metis kaŭĉukan aŭtobendon ĉirkaŭ la kolon de la viktimo. Tiam ili ĝin plenverŝis per bezino kaj fine surĵetis brulantan alumeton. Laŭ posta varianto oni ankaŭ unue dishakis la brakojn de la bruligoto. Tiun metodon oni ankaŭ destinis por miloj da blankuloj ĉe la eventuala venko.

ALIAJ REDAKTOROJ, BONVOLU ATENTI

Ĉiujn revuojn sendatajn intersanĝe por *Bona Espero* vi bonvolu enpoŝtigi ekde nun al

S-ro J.J. Zeelie
Poŝtfako 12271
6006 Centrahil
PORT ELIZABETH
Respubliko de Sud-Afriko

BONA ESPERO

Organo de la Sud-Afrika Esperanto-Asocio (SEA) kaj revuo ĝenerale kultura

Redaktoroj: Bonvolu legi p. 4 pri la nova aranĝo.

Kontribuojn, prefere maŝinskribitajn, oni sendu al la Redaktoroj. Oni sin turnu al ili pri ĉiuj aferoj kiuj koncernas la revuon, krom abonoj. Pri tio ĉi bonvolu legi plu en posta paragrafo.

Respondecaj pri la opinioj publikigitaj la diversaj aŭtoroj kies nomoj aperas kun ili, la Asocio aŭ kluboj kiuj ensendis siajn raportojn kaj la redaktoro nur por propraj skribaĵoj.

Abonoj: La revuo iras senpage al membroj de SEA. Ĝin ricevas aliaj redaktoroj intersanĝe por siaj revuoj. Nemembroj povas aboni, skribante al la Kasisto de SEA, kies adreso aperas sube.

SUD-AFRIKA ESPERANTO-ASOCIO (SEA)

Ĝenerala Adreso: La Sekretario, 75 Bronkhorst Street, Groenkloof, Pretoria, 0181, Respubliko de Sud-Afriko (RSA). *Telefonoj* (prefere hejme): (012) 46 8767 (hejme) (012) 298 3061 (labore).

ESTRARO

Prezidanto: Edwin de Kock, Poŝtako 902-143, Bon Accord, 0009, RSA.

Tel. (012) 50621 (hejme), (01214) 2005/2006/2007/2008/2009.

Vicprezidanto: Axel von Blottnitz, Poŝtako 785441, Sandton, 2146, RSA.

Tel. (011) 272363 (hejme), (011) 802 5290 (labore).

Sekretario: Oscar Sher, Adreso kaj Telefonnumeroj supre.

Kasisto: Colin S. Beckford, Poŝtako 1227, Cape Town, 8000.

Tel. (021) 77 0588 (hejme), (021) 23 6133 (labore).

Aliaj Komitatanoj: Henri W. Appel (Alberton), Simon Donnelly (Cape Town),

Adèle K. Fouché (Port Elizabeth), Johan Hammes (Pretoria), Felix M. Woolf (Cape Town), Cobus Zeelie (Port Elizabeth).

SEA

